

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“

Abonon ni akceptas ne por fiksa tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝinta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“ senpage por ET-abonantoj.

La prezo de unu numero estas por la landoj:

Aŭstra 1000 Kr.	Ĉeĥoslov. 1.20 Kr.	Hungara 30 Kr.	Litova 20 Cd.	Rumana 3 Leol.
Belga 0.60 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.70 Lit.	Nederland. 0.15 Hfl.	Rusa 40 Gmk.
Brita 3/4 P.	Francja 0.50 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.30 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 3 Levaj	Germana 1.50 Mk.	Jugosl. 1.60 Din.	Pola 300 Mk.	Svisa 0.30 Fk.
Dana 0.30 Kr.	Hispana 0.50 Pes.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.50 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Estonoj kaj latvoj demandu la prezon ĉe sia Abonejo. — Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.60 Fk. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la abankonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 80 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komercio“ kaj specialaj numeroj speciala prezo.

Helpu
nian propagandon,
kiun ni samtempe
faras, sendante ĉe
ET
milojn da specime-
noj en multajn land-
ojn. Nia promeso
en
numero 113 va-
loras ankaŭ por
Januaro.

N-o 119 :- Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :- 14. I. 23.

Per — Por.

Caesari quod Caesari, la ideon, kiun mi deziras tie ĉi precizigi, mi ĉerpis el parolado kaj el artikolo de samnacia samideano D-ro Komandoro Stromboli. Mi ne povas tro longe profiti la spacon de ET kaj la afablecon de la leganto. Skize do mi diru.

Mi opinias, ke estas plej efike por propaganda celo la peresperanta praktiko, precipe kiam tio okazas en grava manifestacio. Tiel la valoro de universala kongreso konsistas fundamente en la fakto, ke miloj da personoj kunvenu kaj interkompreniĝu. La laboraj kunsidoj estas iomete interesaj por la ĝisfunde „propagandistaj“ Esperantistoj, neniel por ekstera publiko.

La konferencoj laŭ tipo de la Geneva kaj de l' baldaŭa Venezia, estas jam antaŭenpaŝo al diversa koncepto.

Nune, tamen mi ankoraŭ ne opinias oportune forlasi la sistemon de peresperanta propagando dum universala kaj nacia kongreso, sed apud ili mi vidos plenkonsente, ke organiziĝu internaciaj manifestacioj valoraj pro tio, ĉar ili estas ne peresperantaj sed peresperantaj.

Praktika ekzemplo. Fake kunsidas en niaj universala kongreso la sciencistoj, sed nur por priparoli eblecon kaj organizon de ISA. Ĉu ne estas tre efike, se okazus anstataŭe aŭ apude peresperanta kunveno de sciencistoj, kiel okazas aliaj fakaj kunvenoj ekster Esperantujo? Ni imagu, ke en la sama urbo de la universala kongreso aŭ, pli sendepende, en alia urbo okazus internacia kunveno sciencista peresperanta, kie diversaj fakuloj priparolus fakajn temojn, okazus diskutadoj, dum kiuj diverslandanoj interŝanĝus siajn vidpunktojn en la afero ktp. Fine la diskutadoj povos esti presataj en „dokumentaro“, kiu estus citota en diverslandaj verkoj, recenzota en fakaj gazetoj ktp. vidigante la valoron, taŭgecon kaj utilon de lingvo internacia, de nia lingvo internacia Esperanto.

Kial la antaŭkongresemuloj ne ekkaptas la ideon? Ekzemple por sciencista kunveno mi mem estus preta priparoli temon „Pri fino de geografia regiono karpata“, pri kiu mi jam laboris en verko Itallingva, kaj kiu povos vekti plej interesajn diskutadojn, alportante internacian helpon al la solvo de eleganta geografia problemo. Alla povos trakti ekz. pri „Fartokonsekvencoj de la milito“ aŭ alia pri „Praktika helpebleco de radiotelegrafio al divenado de vetero“ ktp.

Pli longe mi ne klarigas, ĉar mi esperas, ke oni min komprenis. Se unuan fojon ni estos mal-

multaj, tio ne gravas. Aliaj fojon venos eble ankaŭ neesperantaj fakuloj, kaj la afero tiel povas graviĝi, ke ĝi fariĝus iom post iom la kerno de vere internaciaj fakkongresoj, kiajn nur Esperanto ebligas.

D-ro Umberto Toschi,
gen. sekr. de Itala Esp. Fed.

Interna Ideo.

Pri la tiel nomata interna ideo de Esperanto, la Esperantismo, preskaŭ ĉiu Esperantisto havas sian specialan, individuajn opinionon. Estus mal-

facile difini ilin ĉiujn; pro tio mi elektas nur la plej strangan, la plej surprizan opinionon, kiun mi ĝis nun trovis, esperante prui, ke ĝi devenas el miskompreno kaj tial estas malĝusta. Nenature multaj Esperantistoj konstruas kontraŭajn inter Esperantismo kaj naclemo kaj, supozante, ke la unua estas pli valora ol la dua, ili postulas aktivan forigon de la nacioj aŭ eĉ rasoj favore al la Esperantismo. Tre probabla estas la konjekto, ke jam ĉi tie sin kaŝas miskompreno, t. e. pri la ĝusta signifo de la du nomitaj esprimoj. La veran, noblan naciemon oni kredeble intermiksas kun ties frataĉo, la ŝovinismo, kaj la Esperantismo estas por ili neklera idealo, post kies efektiviĝo la tuta homaro konsistus el unu homogena maso sen diferencoj naciaj kaj rasaj, aŭ per aliaj vortoj: la fruktodona konkurado inter la popoloj estus malaperinta kaj anstataŭe tio atinginta stato de eterna sendanĝereco malforiĝa kaj endormiga. Laŭ mia opinio la Esperantismo estas sole kulturo, kaj mi penos prui, ke Esperantismo kaj naclemo — ambaŭ esprimoj laŭ mia difino — ne nur ne esceptas unu la alian, sed kontraŭe, ke la dua eĉ estas la nepre necesa premiso por la ekzisto de l' unua. Sed por la momento ni lasu ĉi tiun problemon nedecidita, kaj antaŭe mi demandas: Ĉu Esperanto povas enhavi en si la ideon pri



Indianaj enloĝantoj de Ecuador (Suda Ameriko).
Nia samideano J. Gill North el Barcelona, kunlaboranto de ET, pri kies sudamerika vojaĝo ni jam raportis en n-o 111, sendas ni nun novan publikitan saluton al Ĉiuj, la ĉefurbo de la Ekvadora Respubliko. La interesa publikato, kiel malgrandigitan reproduktion ni represas ĉi supre, montras grupon de tiel indianaj enloĝantoj.

detruo? (ĉar nenion alian signifas: „aktiva forigo“). Tre ĝena estas ĉi tiu demando, kaj mi dubas, ĉu eĉ fanatikulo kuraĝos respondi per jes. Ĉar propagandante la samaj forigemuloj ja ĉiam akcentas, ke Esperanto estu la komprenigilo, la ligilo inter la nacioj; ĝi estas nomata lingvo internacia, kaj ili mem sin nomas paciaj pioniroj. Kelkaj eĉ tiel fervore proklamas sian pacamon, ke la publiko pensas, ke Esperantismo kaj Pacifismo estas plene identaj. Nun ni imagu: Esperantistoj-pacifistoj tamen volas detrui! Kia nekomprenbla kontraŭeco, kia stranga malkonsekvenco! Ni havas la devon ĝustigi ĉi tiun evidentan miskomprenon kaj ni serĉu la fonton. De kie do venas la penso pri aktiva forigo de la nacioj? Oni citas la Majstron mem, kiu kantis:

„Ni interpopoloj
la murojn detruos,
Kaj ili ekbrakos
kaj ili ekbruos
Kaj falos por
ĉiam...“

Komprenoble tio estas pure poezia alegorio. Cetere li ja parolas nur pri forigo de la muroj apartigantaj la popolojn. Tamen la

efektiva forigo de la muroj per si mem sekvigus la forigon ankaŭ de la nacioj. Sed pripensu: Zamenhof, la pacamanto, la homamanto, estis certe la lasta, kiu pensus pri perforta forigo de la ekzistanta, el homoj konsistanta. Pli ĝuste li volis diri per la cititaj versoj, ke per la ĝenerala uzo de lingvo komuna malfermiĝos la pordoj kaj koroj de la nacioj, ke trans la limojn kreigos fruktoportan interkomunikon inter la popoloj. Multe tro saĝa li estis, krom ĉio cetera, por pensi pri atenco kontraŭ la ekzisto de nacioj aŭ eĉ rasoj.

*) Se tio estus fakto, ni havus antaŭ ni rompon de la tiel glorata neŭtraleco, ĉar ĉi tiu vorto signifas: absoluta senparticeco! Cetere: nenio ĝenu la Esperantistojn esti pacifistoj, sed ili ne diru, almenaŭ ne publike, ke lia idealo estas la senco kaj esenco de Esperanto, ĉar per tia specialigo oni forpuŝus multajn, eble tre seriozajn Esperantemulojn.

Li bone sciis, ke ĉi tiuj estas kvazaŭ individuoj de l' homaro, kiuj havas post si longan historian ekzistadon kaj pro tio ne estas ĉesigotaj senpune. Efektive ĉiu raso, ĉiu nacio fariĝis granda pro siaj specialaj kvalitoj kaj meritoj kaj per tio helpis siaparte al la evoluo de l' homaro. La tasko de Esperanto nepre ne estas forigi la plej gravajn, povas-estil la sole eblajn, kulturfontojn, sed nur egaligi senreste por la tuta mondo la spiritajn trezorojn, kiujn la nacioj akiris per longedaŭraj penoplenaj laboradoj. Nur sur la fundamento de tiaj nacioj Esperanto povas ludi sian veran, unikan rolon. Kio por familio estas la agemulo bonkarakterata, por popolo la gvidkapabla eminentulo, tio estas por la homaro la noblaj nacioj. Komprenoble ili povas erari kiel ĉiu individuo, — la nepravigita milito estas tia eraro — sed oni ne faru ilin objekto de nepruvitaj eksperimentoj. Kredeble ĉiu kulturo, inkluzive Esperanto, pereus kune kun ili! Ni ne postkuru utopiajn, kompromitigajn ideojn, kies lastajn sekvojn priliĝi ni ne estas kompetentaj, sed ni prenu el Esperanto tion, kio estas utila samtempe por la nacio, al kiu ni apartenas, kaj por la tuta homaro. Esperantismo kaj naclemo ne estas du ekscentraj cirkloj, sed koncentraj. Jen estas praktika kaj samtempe ideala kompreno pri la interna ideo, kiun konfirmis unu el la plej malnovaj, el la plej amplekskoraj Esperantistoj, la disciplo, kiu sin klinis al la brusto de l' Majstro kaj komprenis lian koron, la neforgesebla Antoni Grabowski, per jenaj versoj:

„La lingvo benata montriĝis al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci'
Ni flamas en koro fidela;
Kaj same fidelaj al hejma altar'
Ni sentas nin filoj de l' tuta homar'.“

Zanoni.

Eksperimento pri tradukado.

Kelkaj el la rusaj legantoj ankoraŭ memoras eble la „Orientan Almanakon“, donitan de la redakcio de la ĵurnalo „La Ondo de Esperanto“ en 1913, kiel literaturo aldono. Mi citas ĉi tie kelkajn vortojn el la antaŭparolo, verkita de s-o B. Kotzlin:

... retradukante el Esperanto en la nacian lingvaron, oni tiamaniere propagandos efike nian lingvon, demonstrante ĝian praktikan utilon. Mi persone tion spertis, kiam en unu el la plej gravaj

Transgripante li aŭdis voĉojn venantajn el la Instituto, pli kaj pli laŭte ĉi tien sonorantajn. Nun li malsuprenkuris per ĉiuj fortoj la ŝoseon. Ĝi kondukis ĝis la arbaro, sed li ekpensis, ke irante sur ĝi, li povus esti vidata; pro tio li kuris tra la kampo, por mallongigi la vojon.

Rigardante returne li rimarkis, ke jam oni persekutas lin. Samtempe ĉe du elirejoj vidiĝis lumoj; kaj rapidaj paŝoj, akompanataj lin, ne lasis dubon pri la situacio. Malespero rapidigis lian kuradon, kaj senespere kaj ŝvitkovrite li atingis la randon de l' arbaro.

Tie li ekhaltis en arbitaĵo. La lumoj proklamigis kaj la sekaj branĉetoj, kovrantaj la arbaran teron krakis sub liaj paŝoj. La fuganto sin klinis kaj apenaŭ riskis spiri.

Kiam la persekutantoj preterpasis, li daŭrigis la kuregon al la flanko direkto. Li havis la impreson aŭdi de malantaŭe pluajn paŝojn kaj ne lasis al si ripozon.

La arbaro maldensigis denove, kaj laciginte li haltis ĉe la rando, kie sin etendis montetaj herbejoj. Klom ajn laca kaj malvarma li estis, lin tamen plenigis sento de paco kaj ĝojo; kaj nekontraŭstareble lin logis la muĝado de la mal-lumaj arbetoj, tremantaj en la malvarma vento.

Sed ne longe. Ĉar jam denove li aŭdis homajn voĉojn, alproksimigantajn el la mezo de l' arbaro, kaj rapide li estis turnonta sin al la herbejoj, kiam profunda nigra abismo ŝajne baris al li la vojon. Ĉar la arbaro ombrumis ĝin, la fuganto ne povis distingi kiam malfelice lin minacis; nur la nigra faŭko klare rimarkigis inter la grizo de la krepuska duonlumo.

Sed kio povus timigi lin? Li deziris nenion kaj timis nenion. La arbaro aŭdis lian doloron kaj kompatis lin. La vento g'aciligis lian senripozan koron kaj trankviligis ĝin. Nur mal-

La fuganto.

Skizo de Alfred Meyer-Kirstin.

En ĝardeno je la posta fronto de la frenezulejo vidiĝis ĉiutage la sama bildo, kiam la malsanuloj estis ellasataj, por ke ili dum duona horo spiru freŝan aeron. Ĉiuj, kiuj kapablis, sin movis. Tiu ĉi kun mallevita kapo, okupanta sin pri siaj ideoj, promenis de la domomuro ĝis la barilo kaj revenis; tiu rigardis supren, supozeble ekvidante fantomojn lin minacantajn kaj kriis al ili incitajn vortojn. Aliaj, kies spirito ne flom malklarigis, staris kune en grupoj kaj interparoladis. Sed sur benko apud la barilo sidis pala junulo, senmove, kvazaŭ maldorme eksonginte.

Ĝis nun oni preskaŭ neniam aŭdis lin diranta iun vorton; eĉ la kuracisto logis el li nur tre nesufiĉajn respondojn al siaj demandoj. En tiu tago, kiam li estis transportita ĉi tien, konfuza kaj delirita, kaj kiam oni enlitigis lin en la observa ĉambrego, li murmuris kelkfoje: „Mia vivo estas perdita. Sed, por ke mi tamen povu daŭrigi ĝin, mi perdis ankaŭ la prudenton.“

El lia interparolo kun la kuracisto rezultis, ke la malsanulo, studento, sekve de melankolia paroksismo sin malsuprenjetis ŝtuparon, kio kaŭzis al li gravan cerban skuigon. La motivo al tiu faro ŝajnis deveni el grava ama seniluziigo.

Kia ajn tio estis, la studento restadis meditema kaj evitis ateni pri la objektoj de sia ĉirkaŭaĵo. Li kvazaŭ senĉese rigardis malproksiman punkton kaj dume subite ekflagro de liaj nigraj okuloj ofte supozigis internan emocijon. Multfoje li vidis tra la fenestro tien, kie komencis sin etendi la malluma arbaro, kaj sekvis per la okuloj la migrantan nubaron, kvazaŭ envianta ĝin pro ĝia nebarita vojo, ĝia libera sfero; tiuokaze li ekspiris pli rapide kaj liaj manoj sin etendis al

la fenestro, kie duonrustiĝinta krado malpermesis la eligon.

Li ja estis kaptita. Nur lia animo povis sekvi la nubojn tie supre, bani sin en la orlumo de la ĉiela suno, kiu sorĉe vekis en li belajn, felicegajn rememorojn. Li vidis okulojn, kiuj lafoje ameme rigardis lin, manojn, kiuj lafoje lin karesis. Kaj poste li subite rekonsciiĝis kaj vidis, ke ĉio ĉirkaŭ li estas dezerta, ĉio en li rompita, kaj ke li estas kaptita.

Post iom da tempo oni permesis al li, ĉiutage tri kun aliaj malsanuloj sur la kampojn de la instituto kaj tie sub kontrolo dum kelke da horoj plenumi terkulturan laboron. Tion la malsanulo feris, kaj la freŝa bloveto de la unuaj printempaj ventoj iom vigligis lin, kvankam lia tuta agado okazis trankvile kaj silente kaj lia interno daŭre malkvietiĝis.

Ĉe unu flanko de la Instituto troviĝis izola konstruaĵo, la seruristejo. La vojo de la ekstere laborantaj malsanuloj preterkondukis ĝin, kiam ili estis gvidataj returne de la kampo en la instituton.

Unu tagon, kiam la seruristo momenton estis iranta en apudan ĉambroon kaj fenestro de la teretaĝo estis malfermita sekve de plivarmiganta vetero, subite malgrasa brako ŝoviĝis tra la krado, kaj tuj poste prenileto, kuŝinta sur la fenestra breto, estis malaperinta.

La inspektoro-varisto vokis la nomon de l' studento, demandis lin, kial li posirestas. Sed tuj ĉi senresponde aliĝis denove al la malgranda homgrupo kaj rigardis teren, kvazaŭ nenio okazis.

Estis nokto. La studento, kiu logis kune kun alia malsanulo en la sama ĉambro, en sia lito sin ĵetis maltrankvile tien kaj returne, ne povante ekdormi, dum lia ĉambra kunulo de longe estis ekdorminta. Nur la spiro de l' malsanulo, kaj

obtuza kriado, jen pli malproksima, jen pli proksima, venanta el aliaj konstruaĵoj, interrompis la silenton.

Tiuj ĉi sonoj trovis plifortigitan resonon en la bateganta koro de l' malsanulo.

La studento levigis. Li sin vestis per la pantalone, eliris el sub la kapkuseno objekton, kiun li kaŝis en sia poŝo, malfermis la pordon kaj eniris la koridoron.

Lumbrilo de proksime lin ektimigis. La varisto, deĵoranta dumnokte, staris antaŭ li. Kelkaj vortoj sufiĉis. La studento tuj poste troviĝis en ĉambreto, kies fenestro estis malfermita nur per malgranda kvadrato.

Daŭris ne longe, kaj la ŝraŭboj, fiksanaj la ĉefparton sur la krado, falis, kaj baldaŭ la vento enblovis tra granda, senbara aperturo montrante la vojon al la libereco.

La junulo ektemis pro tiu ĉi frosta blovado de la mara nokto. Momenton li hezitis. Eble ŝajnis al li danĝere, vestiĝi nur per ĉemizo kaj pantalone, sin elmeti al la nekompata furiozo de l' malvarmo.

Sed jen li aŭdis muĝadon de malsanuloj; la steloj brilegis desupre kaj li sentis sin forlogata. Kien? Ĉien, nur for de ĉi tie!

Li faris grandegan salteton, tiel ke doloris liaj plandoj kaj li preskaŭ falis genuen; li staris en la korto. Ĉio restis silenta. Unu momenton brilis lumo el fenestro de la koridoro. Ĉu oni aŭdis lin? La lumo remalaperis.

Transgripante la barilon, la fuginto kuris singardeme, kelkfoje turnante la kapon al la Instituto, rekte al la malalta flanko pordo de l' ĉirkaŭbaro. Tie estis la sola loko, kie forkuro facile estis efektiviĝebla, ĉar la ceteraj elirejoj estis gardataj per altaj ferpordegoj, krom tio kovritaj per pikilaj metalfadenoj.

gazetoj en Londono — „The Daily News“ (4/II, en la jaro 1905) — aperis anglia traduko de rakonto de M. Gorkij kun la Redakcia noto, ke la rakonto estas tradukita anglan el mia Esperanta traduko el la Julia n-o de „Lingvo Internacia“ en la jaro 1904. Nun la retradukoj plioftigas kaj ili estas des pli gravaj por nia propagando, se la originalo estas verkita en ne-eŭropa lingvo... Ni kredas, ke la esperanta traduko pli precize reproduktos la originalon ol la senperaj tradukoj el unu nacia lingvo en la alian. Estas kurioze, ke eĉ unu el la plej kompetentaj tradukistoj el la rusa lingvo germanen, s-o L., erare tradukis la frazon: „Al mi apartenas la venĝo kaj mi revenĝos“ per „Mia vico estas ludi kaj mi komencas per la a so“. La eklezie-slava vorto Az (=mi) estas tradukita per simile sonanta germana vorto Ass (=aso).“

Se la kompetenta tradukisto faris tian erarigon, kion devas ni atendi de la plejparto de la ordinara tradukistoj en tia, ekz., okazo, kiel franca esprimo „courir les dangers“ (Cornelle), kiun ĉiu ruse, mi eĉ kuraĝas diri, ĉiu nefranco komprenos „eviti la danĝerojn“, t. e. en la ĝuste kontraŭa senco. Kiel tradukos la nesperta tradukisto esprimojn tiajn, kiel germana „auf Ort und Stelle“, kiel latina „orare atque obsecrare“?

Certe, ke se oni tradukados ne rekte el unu lingvo en la alian, sed komence en Esperanton kaj nur tiam en la finan lingvon, oni ne perdos la ĝustan senco de ĉiuj idioj. Ekzistas la komuna opinio, ke ju pli oni tradukas kaj retradukas la samon, des pli ŝanĝiĝas la fundamenta teksto. Mia opinio estas, ke tiu aserto ne estas vera. Tion oni povas vidi el la eksperimento. Mia artikolo celas nur montri la detalojn de tiu nepre plenumenda eksperimento.

Mi proponas la jenan ŝemon:


Oni elektas du lingvojn — la eliran kaj la helpan. Ni plue signos ilin per la literoj P kaj Q. Poste oni devas elekti sep partoprenantojn — unu P-lingvanon (signota per X), bone sciantan la lingvon, du P-lingvajn Esperantistojn, unu eminentan tradukiston el Q-P-en, aŭ perfekte sciantan la ambaŭ lingvojn; (ilin ni signos sinsekve per A, X kaj Z). Poste ni bezonos du Q-lingvajn Esperantistojn (B kaj C) kaj fine unu tradukiston el P-Q-en (signota D). X verkas tekston de beletristika rakonto (plej bone humoraja) kaj sendas ĝin al A. Tiu ĉi tradukas la tekston Esperanten (signote: tradukas tekston x kaj ricevas tekston a). Tekston a A sendas al B. B tradukas a Q-lingven kaj ricevas tekston b, kiun li sendas al C. Tiu ĉi tradukas b Esperanten kaj sendas sian tekston c al Y, kiu tradukas c P-en kaj ricevas tekston y.

Samtempe X sendas tekston x al D, kiu tradukas x Q-en kaj sian tradukon d sendas al Z. Tiu ĉi tradukas d P-en kaj ricevas la lastan tekston z.


Tiam oni komparas la tekstojn x, y, z kaj konstatas, ĉu z, ĉu y estas pli proksima al x. Se y — la eksperimento sukcesas. Se z — oni nur mezuru la diferencon inter la ambaŭ alproksimiĝoj. Eĉ tiam la eksperimento havos grandegan lingvistikan intereson.

Por la pleja klareco mi donas tie ĉi du ŝemojn de la tuto:

I. Ŝemo montranta la sinsekvon de la partoprenantoj.



II. Ŝemo montranta la sinsekvon de la tekstoj.



Krom tiuj sep partoprenantoj ni bezonos ankoraŭ la gvidanton, kiu se eble devas esti nek P- nek Q-lingvano kaj tra kies manoj devas trapasi ĉiu teksto, antaŭ ol trafi la sekvantan partoprenanton.

Kiel lingvon P mi proponas la francan, konatan de tre multe da Esperantistoj; kiel lingvon Q — la germanan, ankaŭ tre disvastigitan kaj tre malsimilan al la franca lingvo.

Mi ne dubas, ke la proponata eksperimento interesos multe da Esperantistoj. Mi petas ĉiujn legantojn de kiu ajn lingvo komuniki al mi letere ilian deziron partopreni la eksperimenton kaj samtempe verbi neesperantistajn partoprenantojn X, D, Z. Se mi kolektos ĝustlingvajn kolektojn po sep partoprenantoj, mi povos organizi eĉ plurajn similajn eksperimentojn. La rezultoj estos publikigitaj en „Esperanto Triumfonta“.

Mia adreso estas: L. Kowarski, Stroma 5, Wilno, Polujo.

Leo Kovarskij.

Esperantista Rondo „Konkordo“ en Varsovio (Polujo).

Per Esperanto al Repaciĝo kaj Konkordo

Komuniko II.

1. La Varsovia Estraro petas ĉiujn siajn membrojn kaj filiojn en la pola provinco, kiel ankaŭ la adeptojn de l' „Interna Ideo“ en la tuta mondo renovigi la interrilatojn por esti en ĉiama kontakto. Specialan atenton ni petas de l' junulaj rondoj, grupoj ktp., ĉar post nelonge malfermiĝos Junula sekcio de „Konkordo“ (interna ideo).

2. Dum la XV-a internacia kongreso de Esperanto en Nürnberg en 1923, „Konkordo“ aranĝas fak-kunsidon de „Konkordo“ (interna ideo)-adeptoj kaj petas ĉiujn siajn membrojn kaj simpatiantojn je l' „Interna Ideo“ nepre aliĝi. Detalaj informoj estas riceveblaj ĉe l' ĉef-sekretario de „Konkordo“ (adreso sube).

3. Tro ofte fondiĝadas novaj societoj kaj novaj movadoj, kaj same ofte ili malaperadas. Kial? Ĉar antaŭ ol fondi societon aŭ krei movadon oni devus bone informiĝi, ĉu ne ekzistas jam analogia aŭ eĉ samcela movado.

En n-o 11 (novembro 1922) de l' ĝenerala Esperanto (pĝ. 194) s-o E. Vittecoq, redaktoro de Novaj Tempo, turnas sin al la tutmonda Esperantistaro kun alvoko unuigi ĉiujn sam- aŭ preskaŭ samcelajn grupojn (precipe traktantajn pri la interna ideo). La estraro de „Konkordo“ skribis al la redaktoro sian opinion, treege subtenantan tiun ĉi proponon. Efektive tro dispeciĝas niaj fakaj aŭ idealaj movadoj pro la tendencoj apartiĝi en siaj agoplanoj kaj gazetoj. Se ĉiuj samcelaj movadoj havus nur unu gazeton kaj se eventuale ĉiuj membroj (aŭ adeptoj) havus la devon abonadi ĝin, la utileco estus triobla: 1. la gazeto mem, prezentante konglomeraton de ĉiuj idealaj movadoj, disvastiĝas kaj, havante multe da abonantoj, estas vivipova; 2. la samideanaro ne devus ĉiam barakti kun la nesolvebla demando: kian gazeton aboni? 3. sufiĉe granda monŝparo (Esperantistoj ĝenerale ne estas riĉaj).

Ni alvokas tial al ĉiuj tutmondaj idealistoj, propagandantoj la „internan ideon“: Unuigi! En unuigo estas forto. Kaj tiun ni bezonas.

Por la Estraro
Edvardo Lonkopolanski
(Edvardo Wiesenfeld)
ĉefsekretario
Warszawa, Biala 3.

P. S. Ĉiu demando estu provizita per poŝtmarkoj por respondo.

Mallongaj Esp. Scilgoj.

Revizado

de la traduko de la Nova Testamento.

La komitato, kiu zorgas pri la eldonado de la Zamenhof'a traduko de la Malnova Testamento intencas presigi kun ĝi la Novan Testamenton iom revizitan por akordi ĝin kun rilataj partoj de la Malnova Testamento kaj korekti iujn erarojn. La komitato petas, ke interesatoj, kiuj deziras komenti pri neĝustaj, tuj skribu al s-o J. M. Warden, 31 St. Andrew Square, Edinburgh.

La VIII-a

Brazila Kongreso de Esperanto

okazos en Rio de Janeiro 9.—14. de marto 1923, kiel memorigo de la I-a Centjara Datreveno de l' Sendependeco de Brazilujo.

La Ministro de l' Publikaj Laboroj permesis, ke la Organiza Komitato, kies prezidanto estas d-ro Heitor Beltrão, ĝenerala sekretario de la Komerca Asocio de Rio de Janeiro, telegrafu senpage ĉien en Brazilujo. Oni esperas, ke tiu kongreso havos grandan sukceson.

Esperanto kaj la hungarlanda socialdemokrata kongreso (24.—28. dec. 1922).

Inter la proponoj en la nomo de hungara Esp. laboristaro K. Hámán faris tre sukcesan kaj efikan paroladon pri la bezono de internacia lingvo por la tutmonda proletariato. Entuziasma aplaŭdo estis la kongresa respondo kaj la propono:

„aranĝi Esperantajn kursojn en ĉiu faka kaj partia societo, akcepti la lingvon Esperanto por la fakaj kaj partiaj eksterlandaj korespondinterrilatoj oficiale, por ĉi tiujn efektiviĝi oni petu kaj uzu la helpon de la hungarlanda Esp. Lab. Societo“ oni akceptis kaj decidis ĝin aldoni por la novelektita partia gvidantaro, por decidi pri la detala solvo.

Internacia Esperanta

Ligo de Liberpensuloj kaj Monistoj.

La nove fondita unuigo havas jenajn celojn: kunigi la kernajn samideanojn, disvastigi Esp. interliberpensaj kaj monistaj rondoj, aranĝi fak-kunsidojn dum la diversaj naciaj kaj internaciaj Esp. kaj liberpensulaj kongresoj, eldoni gazeton. Rilate al politiko kaj nacieco la ligo estas neŭtrala. La kolizo 1923 ne estas fiksata; pago laŭpluĉe.

Hodiaŭ la ligo havas preskaŭ 70 membrojn el diversaj landoj. Ĝi estas membro de la „Internacia libera laborsocieto“ kaj aranĝas dum la venonta Esp. mondkongreso en Nürnberg fak-kunsidon de liberpensuloj. Inter la membroj troviĝas multe da eminentuloj de la Esp. kaj liberpensula movado. Informojn donas Kurt Hubricht, Leipzig-Neustadt, Mariannenstr. 30 III, Poŝtĉeka numero 43808.

La ekzamena komitato en Köln

de la Germana Esp. Instituto (Leipzig) aranĝos meze de februaro en Köln publikan ekzamenon. Samideanoj, kiuj, vizlonte aŭ travojaĝante Köln, deziras partopreni en ĉi tiu ekzameno, bonvolu turni sin al s-o Junker, Köln, Hohestrasse 26.

Estonujo.

En Tallinn oni starigis ĉe la loka societo »Espero« komence de oktobro de pasinta jaro specialan komisionon, kies tasko estas verki plenan Esperanta-estonian vortaron. La komisiono ekzistas el sekvantaj 8 personoj: prezidanto s-ino Helmi Dresen, vicprez. s-o H. Seppik, sek. s-ino E. Lübeck, helpsek. s-o P. Berg, kasisto s-o J. Vahikeri; s-oj A. Suija, R. Tük kaj J. Tünn. La komisiono kunvenadas dufoje en la semajno, marde kaj ĵaŭde, en la loĝejo de s-ino Dresen.

Kaj la lango diris: „Ne mortigu! Rigardu!“ Mi rigardis la malamikon kaj vidis: Jen, sur la tero antaŭ mi kuŝis mi mem, kun sanga nuko kontraŭ malvarma granlito.

Kun permeso de l' aŭtoro elestonigis
Henriko Seppik.

Paradizo.

Se en via brusto
Vivas koro bona —
Estu ĉiam justa,
Rekta kaj sindona,
Estu senenvia,
Estu oferema,
Al leĝaro Dia
Ĉiam obeema.

Eble, rekompencon
Vi ne havos tere,
Sed de vivo sencon
Vi divenos vere.
Pro ofend', pro krimo
Larm' vin ofte lavos,
Sed vi en animo
Paradizon havos.

M. Soloviev.

Riski, kaj poste persisti.

De André Lichtenberger.

„Tiu ĉi infano neniam lernos iradi!“ — Metinte por unu momento la kudrajon sur la genuojn, la tri aŭguroj — avino, panjo kaj onklino Jeanne — rigardas kun ĉagrena lipgrimaco tiun ĉi dikan malenerĝian sinjoretan Tok, pace sidantan sur la pargeto inter sia pluŝa elefanto kaj sia kartona kuniklo. Li respondas al ili per afabla rideto, kiu sulketiĝas lian pufvangan vizaĝon kaj malkovras liajn ok blankajn detentojn. Kaj ŝvingante venke en sia fermita pugno arlekenan kruron, li

Antaŭ nelonge oni fondis ĉe »Espero« volleyball'an kaj basketball'an trupojn, konsistantajn ekskluzive el junaj Esperantanoj. La 25. nov. la volleyball'a trupo konkuris kun la A-trupo de la plej fama estona sportsocieto »Sport« kaj venkis ĝin per 30 poentoj kontraŭ 18. La 2. dec. la sama trupo venkis ĉi tieajn rusajn skoltojn per 30 kontraŭ 1. La 9. dec. la basketball'a trupo ludis kun la Vestholm'a gimnazio kun rezultato 9:2 por »Espero«. La konkurso okazis en la gimnastikejo de Y. M. C. A., kiu estis plena de publiko.

En Tartu, Valk kaj Tallinn estas fonditaj novaj societoj.

En Pärnu gimnaziana unuigo »Pyee« aranĝis 4 kursojn de Esperanto kun multaj partoprenantoj. Instruas s-o Joh. Tünn el Tallinn.

H. Seppik.

Esperanto en la franca parlamento.

Dum la kunveno de la 6. decembro s-o Marc Sangnier, ĉefo de katolika-demokrata partio »La Juna Respubliko«, parolante pri la postlerneja instruado, diris, ke estas necese elerni eĉ la stenografion, daktilografion, eĉ ldon kaj Esperanton. La oficiala raporto notas post tiuj vortoj: „Diversaj movoj“ t. e. aprobo kaj samtempe malaprobo.

Svedujo.

En Fyrunga fondiĝis grupo.
En Grycksbo grupo fondiĝis. Kurso komenciĝis.

En Mockfjärd kurso de s-o Em. Söderlund por anoj de la loka loĝio de bontemplanoj. La loĝio disponigis senpage ejon en la bontemplana domo.

En Stockholm nova kurso de s-o Carl Ohlsson.

En Tralleborg nova kurso aranĝita de studrondo de bontemplanoj.

En Vinslöv fondiĝis nova grupo »Antaŭen«.

Hispanujo.

En Barcelona la societo »Nova Sento« komencis novajn kursojn sub gvido de s-oj Gil kaj Bolós. — La societo »Paco kaj Amo« malfermis du kursojn. Ĉiuvendrede okazas paroladoj en Esperanto pri ĉiuspecaj temoj. — La grupo »Barcelona Stelo« transloĝiĝis en la straton Baix de Sant Pere 8, kie kunvenas ĉiutage je 7. vespere samideanoj. Kurso gvidata de pastro Fidel Orobít.

En Terrassa la grupo »Lumon« aranĝis novajn kursojn por sinjoroj, fraŭlinoj kaj infanoj. Kurso ĉe la ĥora societo »La Lanterna«, ĉe la respublikana societo (Popoldomo), kaj ĉe la societo »Joventut Terrassenca«.

En Ripollet 5. nov. Esp. tago, konsistanta matene el solenaj Diservoj, posttagmeze el parolado de pastro Fidel Orobít pri lia vojaĝo al la XIV-a en Helsinko. Parolis ankaŭ reprezentantoj el Barcelona, Girona kaj Tarrasa. La ĥoro de la societo »Katolika Junularo« kantis elektitajn katalunajn kantojn kaj finis la feston per la solena kanto de la himno.

Aŭstrujo.

En Wien la Esperanto Kanto-societo »Zamenhof« sukcese propagandas Esperanton per la kanto. La 18. nov. ĝi aranĝis en la blindulhejmo Josefstadt koncertvesperon kun riĉa programo. Jam ĝi povis doni pli ol 600000 kronojn al la blindulhejmo. La adreso de la societo estas: s-ino Carla Staudner, Wien, Strozlgasse 40, Aŭstrujo. — Kurso de s-o Frey ĉe »Bundeslehranstalt für wirtschaftliche Frauenberufe« en la fako por »Koch- und Haushaltungsschullehrerinnen«, kiun partoprenas i. a. s-o Hofrat Hess kun edzino, la direktorino de ĉi tiu lernejo. S-o Frey preparas kurson ĉe la Vienaj skoltaj.

antaŭe lin atendis nova fatalo, ĉar liaj persekuintoj jam tre proksimiĝis.

Kaj li saltis malsupren.

Sonoris tintado, kiel pro maldika, rompiĝanta vitro... La frosta nokto de marto kovris ĉiujn akvariojn de tiu ĉi regiono per glacia tavolo... Poste laŭta muĝado, plaŭdado de la ekscititaj glaciaj ondoj al la bordo. La plaŭdado daŭris ankoraŭ kelkajn momentojn kaj ĉesis.

La fugo estis finita. La vento fajfis tra la branĉoj sian mallaŭtan, misteran kanton, la funebran kanton por la homo ĉi tie pereinta.

Ĉu li sopiris la vivon aŭ la morton?

La lageto, kvazaŭ granda, timiga okulo de l' nokto, gardis la sekretojn de sia viktimo.

Eble la fuginto trovis en ĝi rifuĝejon...

Tio estas vi mem!

Albert Kivikas.

La batalo okazis sur la verto de dezerta kaj malebena monto.

Ni atakegis la malamikon. Pafilojn en la manoj ni kuris kriegante en fajron. La bajonetoj tranĉis la aerkarbon kaj verŝis la ventsangon. La malamiko diskuris panike, ĉiu en apartan direkton. Ĉiu el ni elektis po unu kaj postkuris kiel ĉas-hundoj timiĝintajn cervojn. Ankaŭ mi kuris, kiel sangavida ŝakalo post la vivanta akiro.

La kriado kaj bruado de l' kamaradoj forsonis, pafoj aŭdiĝis el malproksima distanco. Sed sang-avido je l' forkuranta malamiko logis min eĉ pli malproksimen — ĝis kiam neniu sono plu sciligis al mi la estejon de l' kamaradoj. Mi estis blinda

kaj surda pro la sovaĝa ĝojo persekui la malamikon.

Subite mi ekrimarkis mian solecon, kaj haltis senkonsile. Mi aŭskultis. Pri la kamaradoj estis nenla vivsigno.

La malamiko rimarkis mian ŝanceliĝon, sin returnis kaj rapide ekproksimiĝis al mi, mortig-pensojn kontraŭ mia vivo en la animo. Mi estis perdinta la persekut-inicativon kaj miavice ekforkuris de li pro mortotimo.

Nun li sekvis min kiel ombro, proksimiĝis al mi kiel la neevitebla morihoro.

Mi trovis grandan monteton, surventriĝis malantaŭ ĝi kaj ekcelis. Trans la celrigardilon mi vidis, ke la malamiko kuŝas same post monteto kaj celas min. Mi pafis. Li pafis. La kugloj kunpuŝiĝis en la aero kaj falis inter ni teren, la pinto de la unu en tiu de la alia. Mi pafis plian fojon. Li kontraŭpafis. Ree la kugloj kunpuŝiĝis.

La pafiloj malpleniĝis Same la kartoĉuloj. Nun la malamiko levigis de post sia monteto kaj ekatakis min.

Alveninte al ĝusta distanco por balonetbato, lia piedo puŝiĝis je monteto kaj li falis sur la dorson antaŭ mi. La pafilo forflugis el lia mano, la nuko frapiĝis kontraŭ ŝtono. Li restis kuŝanta senkonscie, kaj estis senmova kiel malvivulo. Tiel mia malamiko estis sub mia potenco.

Levante la pafilon por bail lin, en mia koro ekvekiĝis la tuta kolero kontraŭ la malamiko:

Nun mi venĝos la sangon de l' kamaradoj, nun mi venĝos la sangon de la fratoj, la senhonorigon je la fratino kaj je la patrolando!

Jam la mortiga bato estis falonta, kiam la ŝtalbajoneto de l' pafilo ekpendis malstreĉe, kvazaŭ fluida hundlango dum varmega vetero.

Bulgarujo.

En Tirnovo la loka grupo „Lumo“ aranĝis tri novajn kursojn: unu por lernantoj (gvid. s-o Bačovarov), dua por lernantinoj (gvid. f-ino Sabeva), tria por geurbanoj (gvid. s-o Pomakov). — La X-a Bulgara Esp. kongreso okazos dum 1923 en tiu ĉi urbo kaj la grupo ĝin jam preparas vigle. La jara kunveno elektis novan grupan komitato. La adreso de la sekretario estas: s-o Georgi Dončev, Gurko 389, Tirnovo, Bulgarujo.

Esperanto ĉe la centjara Petöfi-festeno en Budapeŝto.

La centjaran datrevenon de la hungara poeto oni solene festas en la tuta mondo, ĉar li estas ĉie konata kiel unu el la plej grandaj lirikaj poetoj. En Budapeŝto okazis la 17. dec. dimanĉe internacia festo por memoro de Petöfi, aranĝita per la societo La Fontaine en la teatro Urania. La festoprogramo estis franca, sed en sep lingvoj sonoris la voĉo de Petöfi: angle, france, germane, itale, finne, Esperante kaj hungare. Esperante la aktoro Julio Baghy deklamis kun granda sukceso tradukon de Kalocsay: „La leono mallibera“. La publiko miris pri la belsoneco de Esperanto kaj estis kvazaŭ memkomprenebla afero, ke ankaŭ Esperanto partoprenas ĉe internacia festo literatura. — En la oficiala Petöfi-ekspozicio aranĝita en la Nacia muzeo inter la tradukoj de Petöfi-poemoj en 16 lingvoj estas ankaŭ Esperantlingvaj tradukoj, kiujn la ekspozicia katalogo aparte mencias. — D-ro Kolomano Kalocsay tradukis cent elektitajn poemojn de Aleksandro Petöfi kaj la populfablopoemoj „Johano, la Brava“. Estus interese scii, kiom da personoj volus havi tiun belan kaj valoran poemaron por povi informi eldonejojn kaj prepari la eldonon dum la centjara-festo de Petöfi.

Esperanto kaj la hungara gazetaro.

La 31. dec. noktmeze estis la centjara naskiĝtago de mond fama poeto Petöfi. La saman tagon multaj tagjurnaloj publikigis la interesan scigon, ke s-o Kalocsay pretigis eldonon de 100 Petöfi-poemoj kaj la popolepopeon „Johano, la Brava“ en Esperanto, kio estos unika en la mondlingva literaturo. La Pester Lloyd, Nép, Pesti Napló kaj Világ per aparta scigo mencias la aperon de la Kristnaska numero de Literatura Mondo.

Hungarujo.

En Budapeŝto la 15. dec. kunvenis membroj de la unua grupo en kafejo Kovács kaj per malgranda programo honoris la memoron de la Majstro. Ĉeestis gasto el Bukarest. — La 30. dec. la grupo ERA havis bon sukcesan familian festeton en la Socia Muzeo. Oni prezentis programon. S-o Baghy deklamis kaj ludis, s-o Sárosy kantis — S-o Baghy finis kurson tre sukcese kun pli ol dek parolantaj Esperantistoj.

En Szombathely la grupo aranĝas Esperantlingvan Petöfi-feston.

En Pécs okazis la V-a hungara landa kongreso verŝajne dum pentekosto de 1923.

Usono.

En New York la 20. dec. la Esperanto Harmonio Klubo malfermis sian novan hejmon ĉe 226 orienta 18a strato. Oni reorganizis la klubon kun ĉirkaŭ 80 membroj kaj elektis J. J. Sussmuth prezidanto, Benjamin Reich vicprezidanto, F-ino Dora Friedman sekretarino, kaj Samuel Lefkov kasisto. La centro estas ĉiam malfermita dum la vesperoj kaj la tutan tagon dimanĉe. Fremdlandaj samideanoj alvenontaj Novjorkon ĉiam estas bonvenaj. Ĉiun dimanĉon je la 3. horo posttagmeze iu sperta Esperantisto prelegas ian interesan temon en Esperanto aŭ la klubo partoprenas en ĝenerala debato. La celo estas pliperfektigi la Novjorkajn Esperantistojn en la praktika uzo de Esperanto. Ĉirkaŭ cent novaj studentoj studas Esperanton nun kaj novaj klasoj malfermiĝos dum januaro.

minon... Ĉu estas konvene lasi neuzita tian okazon? Se liaj okuloj deflankigis momenton de la trezoro, dum li sin jetus surmanen, eble ĝi estus perdita por ĉiam. Inter pasio kaj prudento, la batalo estas emociiga. La pasio venkas....

Tion vidante la aŭgurinoj ne povas tion kredi. Kiel nova Kristofa Kolumbo, sinjoreto Tok levis la ankron, kaj forlasinte la pacan ankrejon de la kanapo, plenele sin direktas al la seĝo. Momente perdita en la mezo de la paragoceano, li mem estas obligata de sia malfermo, ĉirnas ĉiufanken la okulojn ĉirkaŭajn kaj eligas angoran nazospliron. Jam, la avino forgesante siajn plendadojn, levigas por helpi lin. Panjo ŝin haltigas. Rekuraĝigate per la stimulo de la publiko, forprenate de la demono de l' aventuro, sinjoreto Tok denove prepariĝas, kaj balanciĝante, ŝanceliĝante daŭrigas sian marŝon. Du paŝojn antaŭ la celo, li ekglitas, kliniĝas terurege, rerekliĝas per superrega peno, kaj kun venka stertoro, falas triumfante sur la deziregatan kaptajon, dum ĉiuj akklamadas.

Tio estas grava dato. Pri tio mi estas konvinkita. Hodiaŭ per la sola potenco de sia geneco, sinjoreto Tok eltrovis la sekreton de la progreso, la unuan kondiĉon de ĉia civilizeco: unue riski kaj poste persisti.

El la franca lingvo tradukis
M. Tyken.

Aŭskultu!

Ukraina poezio. O. Olesj.

Aŭdu, aŭskultu la krion el fundo,
preĝon el koro sinceran...
vi, kiuj vivas en ĉiu abundo,
jenu peceton paneran!

Poŝtstampa invito por la XV-a!

Jus ni ricevas el Nürnberg leteron, kiu surprizas nin per poŝtstampa invito: „Vizitu la XV-an Universalan Kongreson de Esperanto, 2a—8a de Aŭgusto 1923 Nürnberg.“ Ĉi tiu propaganda teskto (kun germana traduko) estas stampita inter la poŝtaj stampiloj sur la poŝtmarkoj kaj certe estas taŭga propagandilo por nia XV-a.

Finnlanda Foiro

dissendis gratulkartojn, dezirante feliĉan novan jaron al la defendantoj de Esperanto, kune kun prospektoj en ses lingvoj (angla, franca, germana, Esperanta, sveda kaj finna).

Por „Esperanta Ligilo“

ni ricevis de Brazila Ligo Esperantista ĉekon je 20000 germ. mk. (Donaco n-o 238.) La donacintoj estas:

Brazila Ligo Esperantista	10 milrejs.
Brazila Klubo »Esperanto«	5 „
